# Eŭropa Bulteno

**januaro 2006, № 1 (43)**

## *De la redakcio…*




Karaj legantoj!
En unua ĉi jara numero vi povas legi pri Estrarkunveno de EEu en Bruselo, Kongreso kiu okazos venontjare en Maribor, agadoj en Danio, ideoj de Kroatio kaj Germanio. Mi invitas vin partopreni laŭ viaj ebloj en tradukado de la programo por instruistoj farita de britaj esperantistoj. Pli pri tio vidu ĉe http://www.springboard2languages.org . Ankaŭ mi petas sendi viajn opiniojn, artikolojn kaj aliajn interesaĵojn al ni por la postaj numeroj de Europa Bulteno.

Agrablan legadon al ĉiuj!
**Vesna Obradović**

## *Okazajxoj…*

## ESTRARKUNVENO EN BRUSELO

**La 7-an de januaro la estraro de EEU kunvenis en Bruselo. Partoprenis ĉiuj 5 membroj kaj ankaŭ la TEJO-volontulo ĉe UEA Martin Minih. Jen la protokolo de la kunveno:**

### PROTOKOLO DE LA ESTRARKUNSIDO DE EEU OKAZINTA LA 7-AN DE JANUARO 2006 EN BRUSELO

**Partoprenis: Sean O Riain, Flory Witdoeckt, Georgo Handzlik, Petro Balaž kaj Zlatko Tišljar. Kiel gasto partoprenis ankaŭ Martin Minih.**
Oni traktis la kompletan proponitan tagordon kaj akceptis jenajn konkludojn:

1.Estis akceptita la proponita laborplano por 2006 kun unu ŝanĝo. La punkto d) ŝanĝiĝas al - Lanĉi novan kampanjon »Kolekti faktojn pri lingva diskriminacio en ĉiuj formoj kaj ĉie tra Eŭropo«
2.Oni akceptis la proponitan liston de laborkampoj kiujn kontraŭ pago prizorgos Petro Balaž aldoninte novan punkton kiu tekstas:
f) Ellabori kaj prilabori novan propran TTT-paĝaron de EEU

3.Oni akceptis la proponitan enhavprogramon por EEU-kongreso en Maribor en 2007 kaj la proponitajn datojn (29.07-03.08. 2007)
4.1. Estis akceptita la propono de la sekretario pri baza strategia celo de la nuna estrarmandato: krei honoran komitaton de la EEU-kongreso en Maribor el kelkaj parlamentanoj de EU kaj aliaj politikistoj, kiun prezidos Margareta Handzlik. La honora komitato petos akcepton ĉe la slovena registaro en aŭtuno 2006 kaj prezentos al ĝi proponon ke la slovena registaro en unua duono de 2008, kiam Slovenio prezidos EU-on, iniciatu akcepton de dokumento utila por Esperanto. La estraro havis tri proponojn pri tiu dokumento kaj ne povinte decidi definitive kiun akcepti, oni decidis esplori ĉe slovenaj registaraj instancoj, kiun el la proponoj ili pretus subteni:
a) Postuli de la Eŭropa Komisiono raporton pri funkciado kaj uzebleco de Esperanto en internacia komuniakado
b) Postuli de Eŭropa Komisiono ŝanĝon de la lingvolisto kiun subtenas eŭropaj fondaĵoj Socrates, Leonardo kaj Youth kaj pretas subvencii kadre de siaj konkursoj vastigante ĝin al ĉina, araba, japana, korea, rusa kaj ĉiuj lingvoj de minoritataj kaj diasporaj lingvokomunumoj en EU inkluzive de esperantistoj (kataluna, eŭska, romaa, kurda, esperanto kaj aliaj…)
c) Same kiel B sed vastigante ĝin al »ĉiuj lingvoj de la mondo«.
4.2. Margareta Handzlik daŭrigos sian iniciaton poiome sendi materialojn rilatajn al Esperanto al la EU-parlamentanoj. La unua sendaĵo estos unupaĝa letero kun raporteto pri Nitobe-simpozio en Vilno en ĉiuj naciaj lingvoj. La dua sendaĵo estos mallonga resumo de Grin-raporto ankaŭ en ĉiuj lingvo de EU kaj la tria resumo de la libro de R. Philipson.
5. Raporto Grin estu uzata post kiam ĝi estos tradukita al pluraj lingvoj kiel grava dokumento aldonebla al diversaj iniciatoj.
6. Financoj: Por sukcesigi la kampanjon pri monkolektoj por krei DVD-filmon pri la E-movado »Kia povus esti Eŭropo« a) la prezidanto de EEU salutparolu ĉe la malfermo de UEA-kongreso kaj instigu la kongresanojn helpi (samtempe la filmteamo klare signita per apartaj T-ĉemizoj filmados okazadojn dum la kongreso), b) li sendos personajn leterojn al multaj homoj de la movado kiuj jam montris sian pretecon helpi al similaj kampanjoj c) li skribos leteron al ĝenerala esperantistaro sendota rete kaj direktita persone.
Estis akceptita propono, ke por la laboro de Petro Balaž EEU pagu al li 500 eŭrojn monate por la periodo de la 1-a de januaro ĝis la 31a de decembro 2006.
La sekretario kaj Vesna Obradović ellaboros financpeton por EU-fondaĵo kiu financas funkcikostojn de neregistaraj organizoj kun eŭropa celo.
Protokolis: Zlatko Tišljar

## TAGORDO POR LA ESTRARKUNSIDO DE EEU LA 7-AN DE JANUARO 2006

**1. Laborplano por 2006**
a) Prepari la diskuton kaj realigi la Strategian forumon dum la UK en Florenco
b) Zorgi pri la kampanjo DVD-filmo „Kia povus esti Eŭropo?“
c) Regule monate prizorgi Eŭropan Bultenon kaj dissendi informon pri ĝi al pluraj eŭropaj listoj, asembleanoj de EEU kaj landaj asocioj kaj iliaj listoj
d) Zorgi pri financoj (klopodi fariĝi organizo regule financata de EU, ellabori projekton por fondaĵo destinita al EU NROj, kotizado, helpo de donacantoj, financado de kampanjoj...)
e) Ellabori raporton pri la agado en 2005
**2. Profesiaj laborkampoj por Petro:**
a) Prizorgi la kampanjon kaj ellaboron de DVD

b) Prizorgi la distribuadon de informoj kiujn produktas EEU (Bulteno, alvokoj, apartaj diskutoj kaj klarigoj), ĝisdatigi la adresarojn.
c) Kompletigadi la TTT-ejon de EEU kune kun Aaron lingvo.org inkluzive de kolektitaj materialoj pri lingva diskriminacio
d) Daŭrigi kompletigi la kampanjon pri diskriminaciaj laboranoncoj
e) Produkti raportojn pri sia laboro
**3. Akcepti laborprogramon kaj datojn de la EEU-kongreso** en Maribor en 2007 kun peto al Margareta Handzlik fariĝi ties aŭspiciantino
**4. Diplomatiaj aktivadoj** kaj partoprenoj en lingvaj konferencoj
**5. Proponoj de Renato** (1. kampanjo "hungaraj rajtoj", 2. kampanjo "disvastigo de la Raporto Grin", 3. kampanjo "Reago al la aserto pri manko de kulturo fare de la dokumento pri multlingveco.")

## PROVIZORA PROGRAMO DE LA EEU-KONGRESO EN MARIBOR 2007 (29.07-03.08.2007)









Solena Malfermo kun prelego pri Slovenio
**A) Ĝenerala Kongresa Temo**: AKVO difinas eŭropan estonton de la 21a jarcento

- 2 sesioj dediĉitaj al la ĝenerala temo (kelkaj prelegoj de fakuloj pri akvo kaj ekologio) , 4 horoj
- 2 filmoj pri marĉoj, birdoj, riveroj kaj slovenaj akvoj, 2 horoj
- prezento de www.burger.si , 2 horoj
- diskuto pri scienca terminologio en esperanto (biologio, ekologio), 4 horoj

**B) Konferenco pri »Kion lernu EU el jugoslavia lingva sperto«**
4-6 prelegoj de fakuloj kaj diskutoj, 8 horoj
**C) EEU-TEMOJ:**

- Asembleo de EEU , 3 horoj
- Estrarkunvenoj de EEU , 4 horoj
- Strategia forumo de EEU , 3 horoj,

**D) Kulturaj programoj**:

- Koncerto de slovena koruso miksita kun folkloraĵoj, 2 horoj
- Filmo: Laktokremo kaj marmelado (slovena filmo kun subtitoloj en esp.) , 2 horoj
- 2 aliaj E-filmoj, 4 horoj
- 2 koncertoj ekstere de populara muziko (Jomo + iu E-grupo), 3 horoj
- Koncerto de operkantistino , 1 horo
- Teatra vespero , 1 horo,

**Paralelaj programoj:**

- "ĝangalo-babilejo"
- ĝardenistoj- esperantistoj



- kurso de esperanto (6 hora por mariboranoj kaj kunuloj de partoprenantoj)
- fotoekspozicio
- Esperanto-kulturo en urba biblioteko
- Esperantistoj prezentas siajn landojn kaj regionojn (en Andragogia centro de Maribor)

t.e. 30 prelegoj po 25 minutoj kun tradukoj (por la neesperantista publiko)
Solena fermo

**Zlatko Tišljar**

## DANA ESPERANTO-ASOCIO PARTOPRENOS LA DANAN SOCIAN FORUMON

Dana Esperanto-Asocio partoprenos la danan Socian Forumon de la 3 ĝis la 5 de februaro. Ni aranĝis atelierojn kie Robert Phillipson kaj lia edzino Tove Skutnabb-Kangas prelegos pri lingva politiko en EU kaj pri lingva, kultura kaj biologia diverseco, kaj alia dano prelegos pri mortigo de lingvoj. Ni havis ankaŭ kontakton kun IWGIA, la Internacia Laborgrupo por Indigenaj Aferoj kiu havas ĉefoficejon en Kopenhago, kaj interkonsentis kunlabori pri tiaj aranĝoj estontece.

**Ileana Schrøder**

# *Projektoj…*

## INSTRUISTINOJ, INSTRUISTOJ!



Ni forte rekomendas la novan, ĉarmegan Springboard (Saltotabulo)-programon de niaj britaj geamikoj. Vidu ĉe http://www.springboard2languages.org ...
Oni povas interesiĝi ĉe la tre kara S-ino Angela Tellier, kies retadreso estas angela.tellier@btconnect.com . Ni ricevis de ŝi tre valorajn informojn, kune kun la priskribo de la kapabloevoluiga rolo de Esperanto, verkita de Profesoro Renato Corsetti. Ni nun disvastigas la kopiojn de la faldfolio "A flying start! Springboard ...to languages!" inter la hungaraj esperanto-pedagogoj.
Estus tre bone traduki la lernomaterialojn en ĉiujn lingvojn de EU, kaj prezenti ilin en la edukministrejoj.

**Ludoviko Molnar kaj Julinjo Farkas**

# INICIATO EL MUNKENO

Raumistoj aŭ finvenkistoj, la esperantomovado de la lastaj tempoj estis en sin mem turniĝinta. Necesas malfermiĝi al la ekstera mondo.
Al ĉiu esperanto-kunveno necesas inkluzivigi la eksteran publikon. De la UK ĝis lokaj aranĝoj, ĉiam devus io okazi kie ankaŭ la neesperantistoj estus atingitaj.
La procezo jam komenciĝis, ni devas ĝin nur intensigi. Lastjare okazis kelkaj publikaj aranĝoj, kiujn ni devas daŭrigi kaj novajn aldoni. Tiusence mi volas nomi ekzemple la agadojn de; HD Platz, M. Bronŝtein, Jomo, R. Glomp, K Breuninger kaj kelkaj aliaj.
En la interreto komenciĝis renesanco de Esperanto. Tiun efikon ni povas uzi kaj pludoni al aliaj sferoj. Por daŭ ra sukceso ne sufiĉas resti nur virtuala, sed necesas eksporti en la reala vivo al la publiko, sinergie sur la strato. Plej bone tuj eĉ politike, ĉar ĉiu publika agado kaj Esperanto en si mem, havas ankau politikan komponanton, ĉu ni esperantistoj tion volas akcepti aŭ ne.
Kun informtabloj surstrate en Munkeno ni jam kolektis kelkajn spertojn. Tiujn ni volas uzi, intensigi kaj laŭ niaj fortoj profesiigi.
Nun nia propono:
Montri konkrete kiel funkcias internacia lingvo per vivantaj homekzemploj el eksterlanda urbo.
Informtablo kun kutimaj varbadmaterialoj, folioj, ĵurnaloj, libroj, ktp.. En la fono sur afiŝo (0,5/3 m, au se eblas eĉ pli granda) por pasantoj el malproksimeco bone legebla, en la respektiva nacia lingvo.
Ekz. en Munkeno: Die Bürger von Paris und München mit Esperanto für Europa.(La civitanoj de Parizo kaj Munkeno kun Esperanto por Europo.)
El eksterlanda urbo devas ĉeesti minimume 2-3 personoj kun kiuj ni demonstru per vivantaj ekzemploj la internacian komunikadon.

Karaj Esperantistoj en Parizo,
kiuj el Vi pretas kunlabori ĉe tiu projekto, inter Parizo kaj Munkeno, aŭ inter Budapeŝto kaj Parizo ?
Bonvolu kontakti; Eugeno Macko, rete, au tel. 049-89-280788 en Munkeno.

**Eugeno Macko**

## *De la listo…*

# LINGVAJ RAJTOJ

Mi sekvis vian diskutadon kaj volas informi vin ke - laŭ la unua traktado pri la Eŭropaj institucioj - la interna organizado de ĉiu institucio de la hodiaŭa Eŭropa Unio apartenas al la Institucio mem, do, ĉiu Institucio de EU povas organizi sian internan komunikadon laŭ ĝia bezono !!!
Tial vi havas la fakton ke la Eŭropa Kortumo en Lŭ emburg elektis en sia komenco (kiam nur ekzistis kvar oficialaj lingvoj: germana, franca, itala kaj nederlanda) nur unu labor-lingvon, la francan !!!
La Eŭropa Komisiono decidis labori en tri lingvoj, la angla, la franca kaj la germana.

Estas granda iluzio pensi ke la interna lingva situacio ŝanĝiĝos en la estonteco sen prezenti long-tempan konvinkan strategion iri de la nuna diskriminaciema situacio al ideala ne-diskriminaciema solvo. (La diskuto pri la itala kaj hispana lingvo estas nur ekzemplo kiu malhelpas atingi racian kaj efikan solvon por la interna, profesia komunikado en la EU institucioj).
Esperantistoj faras ofte la eraron montri jam la finan solvon por la komunikado en la institucio, sed ne prezentas konvinke la vojon kaj la argumentojn por long-tempaj transiraj paŝoj de la nuna situacio al la ideala situacio en la estonteco!
Tion, kion esperantistoj povus fari estas
- unue, demandi kiamaniere la Eŭropa Komisiono volas eviti diskriminacion en la interna profesia komunikado de ĝiaj institucioj en la estonteco,
- due, proponi ellabori komparajn studojn pri neŭtralaj lingvaj solvoj kaj
- trie, peti analizon de ne-diskriminaciaj plan- aŭ helplingvoj,
- kvare, peti subtenon (financan) por la organizado de lingvaj eksperimentoj en plan-lingvoj sub scienca kontrolo,
- kvine, peti pri konkludoj de studoj kaj eksperimentoj kaj pri decidoj rilate al long-tempa celo de ne-diskriminaciema komunikado ene de la Eŭropaj Instuticioj,
Kaj nur tiam sekvas batalo por la ne-diskriminacia komunikad-solvo, do por Esperanto aŭ alia neŭtrala kaj ne-diskriminacia lingvo kiu devus plenumi preskribitajn kriteriojn kiujn Eŭropaj Institucioj difinus (en franca lingvo oni nomas 'cahier de charges').
Do, karaj esperantistoj ege aktivaj, ne forpafu vian pulvon nur fanfaronante pri Esperanton, sed sekvu komunan long-tempan strategion kiu havas pli da ŝancoj esti realigota !
Ni, en la Erasmus-Stud-grupo, kiu jam organizis du unu-tagajn seminariojn en la Eŭropa Parlamento en Brussel/Brŭ elles (vidu en interreto: www.eŭrope-citizen.net) estas konvinkitaj ke tio estus la plej efika, sed ankaŭ la plej daŭra strategio por atingi efikan kaj ne-diskriminacian komunikadon ene de Eŭropaj Institucioj kaj inter popoloj en la estonteco.

**Michael Cwik**
(Forumo por lingvaj rajtoj kaj kultura diverseco)

## *Bona ideo…*

## SENDU VIAN JUNAN MEMBRON AL IJK EN SARAJEVO!



SARAJEVO

Kroata Esperanto-Ligo decidis premii junan membron per partopreno en Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo en aŭgusto 2006. Unu sian junan membron sammaniere premiis Esperanto-Societo "Božidar Vančik" el Varaždin. Tiel ni volis helpi lingve perfektigi nian junan membron kaj samtempe helpi al la sukceso de la kongreso en Sarajevo.
Ne ekzistas en la mondo alia kongresa urbo komparebla kun Sarajevo pro ties militaj suferoj en la lasta jardeko.
Ĉu la aliaj el niaj 60 landaj asocioj povus iom pensi tiudirekten en 2006 kiam Sarajevo la unuan fojon post la milito gastigas grandan internacian junularan aranĝon?

**Spomenka Štimec**

**Eŭropa Bulteno. Januaro 2006. № 1 (43)**
**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

**Finredaktita: la 30-an de januaro 2006.**
**Redaktorino: Vesna Obradović.**
**En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Michael Cwik, Eugeno Macko, Ileana Schrøder, Ludoviko Molnar kaj Julinjo Farkas, Spomenka Štimec kaj Vesna Obradović**
**Leterojn kaj komentojn sendu al la seretario de EEU: zlatko.tisljar@azm-lu.si**
**Kontaktoj: komunikadcentro@esperanto.org kaj vesna.obradovic@email.si**
**Retpaĝo: http://www.lingvo.org**